# Loĝado


dum

## La 58-a Kongreso de ILEI

**19-26 julio 2025, Beogrado, Serbio**

***Bonvolu rezervi ĉambron per reta mendilo laŭ la oferto en ĉi tiu dokumento.***

## La hotelo




La 100 jarojn aĝa sed moderne organizita kaj ekipita kvarstela Hotelo "Palace" (Palas, https://palacehotel.rs/) en la malnova urbocentro, facile atingebla el la Beograda Flughaveno "Nikola Tesla", disponigas kvar diversgrandajn kaj diverstipajn salonojn por ĉiuj kongresaj programeroj (krom la ekskursoj, kompreneble), ĉambrojn unu- kaj du-litajn kaj apartamentojn du- kaj tri-litajn, bufedajn matenmanĝon kaj tagmaĝon kun la ebleco ankaŭ vespermanĝi tie.

Ĉiu ĉambro kaj apartamento havas banĉambron, klimatizilon, fridujon, sendratan retkonekton, skribtablon kaj satelitan TV.

Parkejo: eblas rezervi privatan parkejon proksime al la hotelo kontraŭ 25 EUR tage. Registriĝo en la hotelo ekde 14:00 (UTC+2), forlaso de la ĉambro ĝis 11:00 (UTC+2).

La hotelo disponigas unu el siaj du restoracioj por la kongresanoj (Restoran "Klasik", teretaĝe).



## Prezoj

La prezoj en ĉi tiu dokumento estas donitaj en eŭroj (EUR) kaj dinaroj (RSD) kaj validas ĝis la 1a de aprilo 2025. La loĝkostoj pageblas en ajna el la du valutoj. Kaze de drasta ŝanĝo de la hotelaj prezoj kaj/aŭ kurzo de RSD kontraŭ EUR, ankaŭ la loĝprezoj por kongresanoj povas ŝanĝiĝi.

## Ĉambroj

Vi povas elekti ĉambron laŭ viaj plaĉo, poŝo kaj bezono: ĉu kiel unuopulo, aŭ duope, triope, familie.

Se vi rezervas ĉambron aŭ apartamenton por duopo, triopo aŭ familio, nepre indiku ĉiujn kunloĝantojn.

Se vi rezervas unu lokon en dulita ĉambro, vi povas indiki kiun vi deziras por kunloĝanto se ankaŭ li aŭ ŝi konsentas.

La kvanto de rezerveblaj ĉambroj en la hotelo “Palace” estas limigita.

La tipoj de la ordinaraj ĉambroj estas:


- unulita,
- dulita – kun apartigitaj litoj,
- dulita – kun duobla lito.



*Unulita ĉambro*



*Dulita ĉambro – apartigitaj litoj*



*Dulita ĉambro – duobla lito*

## ***Apartamentoj***



La apartamentoj konsistas el dulita dormoĉamro (duobla lito, apartaj litaĵoj) kaj tagĉambro kun sofo, kaj propra banĉambro. Vi povas rezervi la apartamenton por du aŭ tri personoj. La sofo en la tagĉambro uzeblas kiel tria lito por la opcio tripersona apartamento.

*Loĝrezoj por unu persono en **EUR***:

*MM – matenmanĝo, TM – tagmanĝo (la lasta kolumno estas korektita al 6TM pro la lasta tago, 16.07.)*

| **Tipo de la ĉambro** | Por unu nokto kun MM | Por la tuta semajno kun MM | Por unu nokto kun MM+TM | Por la tuta semajno kun 7MM + 6TM |
|---|---|---|---|---|
| 1-lita | 57 | 399 | 73 | (~~511~~) 495 |
| 2-lita | 41 | 287 | 57 | (~~399~~) 383 |
| 2-persona apartamento | 50 | 350 | 66 | (~~462~~) 446 |
| 3-persona apartamento | 46 | 322 | 62 | (~~434~~) 418 |

*<u>Loĝrezoj por unu persono en **RSD**</u>*:

*MM – matenmanĝo, TM – tagmanĝo (la lasta kolumno estas korektita al 6TM pro la lasta tago, 16.07.)*

| **Tipo de la ĉambro** | Por unu nokto kun MM | Por la tuta semajno kun MM | Por unu nokto kun MM+TM | Por la tuta semajno kun MM+TM |
|---|---|---|---|---|
| 1-lita | 6.669 | 46.683 | 8.541 | (~~59.787~~) 57.915 |
| 2-lita | 4.797 | 33.579 | 6.669 | (~~46.683~~) 44.811 |
| 2-persona apartamento | 5.850 | 40.950 | 7.722 | (~~54.054~~) 52.182 |
| 3-persona apartamento | 5.382 | 37.674 | 7.254 | (~~50.778~~) 48.906 |

## <u>Manĝoj</u>

La baza loĝprezo inkluzivas la matenmanĝon.

Duonpensiono: Por tagmanĝo pagendas aldonaj 1900 RSD aŭ 16 EUR (prezo por hotelaj loĝantoj)

Kongresanoj kiuj ne loĝos en la hotelo "Palace" kaj mendas NUR tagmanĝon pagas 17,5 EUR aŭ 2.050 RSD.

Por la lasta tago (26.07.2025) ni kalkulis nur matenmanĝon (lasta kolumno en la tabelo kun prezoj: 7 noktoj + 6 tagmanĝoj), sed se iu deziras, povas mendi ankaŭ tagmanĝon por la fina tago.

Vespermanĝo kostas aldone 15,5 EUR aŭ 1.800 RSD tage – prezo por ĉiuj kongresanoj.

Eblas vespermanĝi ankaŭ eksterpensione, ĉu en restoracioj de la hotelo, ĉu en iu el la multaj lokstilaj restoracioj ĉirkaŭe, ankaŭ je malpli kosta opcio de bakejoj kun riĉa sortimento de loke specifaj aŭ internacie famaj bakejaj frandaĵoj.

***Vi povas rezervi ĉambron kaj manĝojn en la hotelo "Palace"***
***per la reta mendilo. La mendo validas nur post antaŭpago de 100 eŭroj*** *(por tiuj kiuj ne bezonas vizon kaj invitleteron).*

***Noto por la kongresanoj kiuj bezonas invitleteron:***

- ***Ni petas pagi la tutan mendon (loĝadon kaj tagmanĝon);***
- ***Krom la pagopruvilo ni petas vin tuj sendi ankaŭ la kopion de la pasporto.***

**Pagmanieroj:**

**Eksterlandanoj:** (kiel ĉe la kotizopago, prefereble uzu la unuajn du opciojn)

- **Al ILEI-konto ĉe UEA ilek-a**, indikante „ILEI-Kongreso 2025"
- **Al ILEI-konto ĉe ING-banko**, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, aldonante 5 €; el EU-landoj senkoste.
- **Al la fremdvaluta konto de Serbia E-Ligo**: „Udruženje esperantista Srbije" ĉe NLB Komercijalna banka AD vidu la paginstrukciojn (Atentu pri la bankokostoj! Ĝis nun la banko prenis po 10 eŭroj ĉe ĉiu pago.)

**El Serbio:**
Al LKK al dinara bankokonto de la landa asocio „Udruženje esperantista Srbije" ĉe NLB Komercijalna banka AD, 205-0000000422411-63 (sendu konfirmilon al laslo.az@gmail.com, serbialigo@gmail.com)

**Bonvolu sendi informon** pri via pago al LKK: ilei.kongresoj@gmail.com kaj laslo.az@gmail.com

**Bonvenon kaj agrablan restadon!**